FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner - Esperanto - Vereinigung
in der Stiftung Bahn - Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 2 April / Junio 1999



Foto: Frank

Seniorentreffen in Fulda

Diese Esperanto - Straße am Bahnhof Fulda
wurde 1967 im 19. IFEF - Kongreß eingeweiht.

Brila IFEF-Kongreso en Francio

En Le Mans, fame konata urbo pro sia ĉiujara aŭtomobilkonkurso, kolektiĝis inter la 8a kaj 15a de majo 1999 pli ol 280 fervojistoj, inter ili 23 germanoj, por praktiki Esperanton en la 51a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso. LKK-prezidanto Jean Ripoche kore bonvenigis la ĉeestantojn en la palaco de kongresoj kaj kulturo. Honoraj gastoj, inter ili Gilbert Schmit, ĝenerala prezidanto de FISAIC, Pierre Robiolle, honora prezidanto de LKK, krome reprezentantoj de fervojo kaj urbo akcentis la valoron de Esperanto kiel paca ligilo inter popoloj malgraŭ militaj eventoj en orienta Eŭropo. 20 landaj asocioj, UEA kaj IKUE transdonis salutojn per siaj delegitoj. GEFA-prezidanto Gießner atentigis pri la DB-giĉeto dum la venonta Universala Kongreso en Berlin kaj pri la tiea kunveno de IFEF-membroj. Romano Bolognesi dankis kiel prezidanto de la Internacia Fervojista-Federacio (IFEF) al la franca sekcio, ke ili organizis je la kvara fojo la internacian kongreson, kaj deklaris ĝin malfermita. La solenan inaŭguron akompanis la koruso de Patrick Le Mault per verve prezentitaj kantoj, inter ili ankaŭ la Esperanto-himno. Antaŭ la malfermo granda parto de kongresanoj partoprenis ekumenan diservon en la moderna preĝejo Sankta Bertrando.

En la plenkunsido la IFEF-estraro pritraktis kun la komitato estintajn kaj venontajn aranĝojn. GEFA-membro Gernot Ritterspach estas nomumita postmorte honora membro; ankaŭ Otto Rösemann elektiĝis honora membro de IFEF. En la jaro 2000 la IFEF-kongreso okazos en Budapest kaj en 2001 en Ĉeĥio, konforme la skisemajnoj en Francio respektive en Slovakio. Okaze de la 90a jubileo de la fervojista Esperanto - movado aperis aĉetebla dokumento, la Historio de IFEF pri la jaroj 1984 - 1999, kompostita de GEFA-prezidanto Gießner. Malpli bona estas la konstanta malkresko de la federacia membraro. Ekzistas ankoraŭ 1500 membroj, el ili 70% pli ol 65 jarojn aĝaj. Pro tio la financado de la federacia organo estas danĝerigata.

Des pli laŭdinda estis la laboro de la fake aplika kaj terminara sekcioj. La fakprelego de la francaj kolegoj okupiĝis pri la malfacila evoluo de „La fervojo kaj la entreprenokomitatoj". Tiu organizaĵo eble estas komparebla kun la germana BSW. Interesaj estis ankaŭ prelegetoj de alilandaj kontribuintoj: Stato de firma interligo trans la Sundon (Danio); Kopenhaga metroo (Danio); Vagonoj kun kurbiĝa tekniko (Svisio); Grandrapidaj trajnoj sur la linio Berlin - Wien (Ĉeĥio); Ŝveba trajno Transrapid (Germanio); Enkonduko de la Eŭro en la internacia kontregulado (legita por Jugoslavio). Ankaŭ la terminara laboro kune kun la Internacia Fervojunio (UIC) kontentige daŭras. La revizio de fervojaj terminoj en la eldonota Plena Ilustrita Vortaro finiĝis. Sub la temo „Movadaj aferoj" oni diskutis pri la strukturaj ŝanĝoj de la fervojoj sekve de privatigo. Kiu preferis la estintecon, lasis transporti sin dum duontaga ekskurso per turisma vagonaro tirita de vaporlokomotivo.

Ne mankis la tradicia balo post bonega bankedo. La urbo invitis al akcepto en la kongresejo. Kelkaj gazetoj raportis favore. Librovendejo ofertis inter multnombraj presaĵoj bildkartojn memore pri la kongreso. La poŝto uzis porokazan stampon. Filatelia ekspozicio montris fotokopiitajn Esperanto-poŝtmarkojn. Privata arbovartejo invitis al vizito. La regiona televidstacio intervjuis kongresanojn. Ne ĉio estas

menciita. Zorgeme kaj laŭdinde LKK preparis la distrajn kaj turismajn programerojn. La fervojista blovorkestro el Le Mans bonege interpretis klasikajn kaj gajajn muzikpecojn. Ne malpli aplaŭdon ricevis la same fervojista koruso de la Amikeca Klubo konsistanta nur el emeritaj gekantemuloj. La folklora vespero estis granda plezuro por okuloj kaj oreloj. La regiona grupo La Gouline Sarthoise prezentis altkvalitan spektaklon pri la kampara vivo kaj somera festo kaj finis per la fama danco Supjupo-ĉevalo. Neforgesebla la mallonga komedio verve ludita de Josette Vonaj kaj Daniel Chevallier. Jam dimanĉe oni vizitis en pluraj grupoj la historian kvartalon. Estas juvelo de mezepoko. Enmeze superstaras la katedralo. Ĉion ŝirman grandega muro kaj dikaj turoj. En la urbeto Solesmes la ekskursantoj aŭskultis atenteme gregoriajn ĉantojn en la abateja preĝejo Sankta Petro de la benediktina monaĥejo. Poste veturis la aŭtobusoj laŭlonge de la rivero Sarthe ĝis Malicorne, urbeto de potistoj. Tie oni demonstris la produktadon de altvaloraj fajencoj. Inter multaj kasteloj borde de la rivero Le Loire estis vizitita tiu de Le Lude. La ekskursantoj povis rigardi kelkajn meblitajn salonojn, ĉar la kastelo estas loĝata de aristokrata familio. La ĉirkaŭa parko permesis promeni kaj ripozi. La tuttaga ekskurso kondukis al Saumur, situanta ambaŭborde de Le Loire. Granda maneĝo akceptis nin, en kiu ni povis silente observi rajdantojn dum la ekzercado. En la plene aŭtomataj staloj ripozas 400 kastritaj ĉevaloj prizorgataj de 200 dungitoj. Ĉiuj servas al la lernantoj de rajdarto. En granda vinkelo sekvis tipe franca menuo akompanita de vingustumado en gajaj rondoj. Iom streĉa estis la posta vizito al la fiere staranta kastelo Saumur. Dekoraciitaj salonoj kun pentraĵoj kaj gobelenoj atestis pri la arto de antaŭaj jarcentoj. Sub la tegmento allogis ekspozicio pri tutmonda rajdhistorio. La ekskurson finis vizito al la konata Esperanto-kastelo Grésillon. Varma akcepto kun regalo de la gastoj, sed la estonteco de la kastelo ne estas certigata pro altrudita renovigo. Dezirindas donacoj.
Koran dankon al la senlacaj kaj ĉiam ĝentilaj organizantoj kaj helpantoj. La 51a IFEF-kongreso akompanita de bone informanta kongreslibro meritas esti nomita brila kaj sukcesplena. W.B.

Nachkongreß in der Normandie

Nach Beendigung des 51. IFEF-Kongresses in Le Mans fuhren fast 50 Teilnehmer, darunter mehrere Deutsche, zu einem Nachkongreß an die Atlantikküste. Die französischen Kollegen hatten ein Feriendorf in Colleville-sur-Mer als Standquartier für 3 Tage ausgesucht. Starker Nordost sorgte für stetige Abkühlung und eine Fluthöhe, wie sie nach dortigen Aussagen nur einmal im Jahre vorkommt.
Drei Busausflüge führten uns zu sehenswerten Punkten der Region. Am ersten Tage lernten wir den östlichen Teil der Normandie kennen und dort vor allem den Fischereihafen Honfleur mit seiner aus dem 17. Jahrhundert stammenden Holzkirche. Später konnten wir die riesige 2641m lange Brücke, 1995 errichtet, über die Seine bei Le Havre bestaunen. Sie hat eine Rekordspannweite von 865m.
Ein Ausflug in den Westen der Normandie führte zunächst in eine Glockengießerei, wo man heitzutage den Gießvorgang der Glocke und sogar die Tonfrequenz elektronisch steuert. Die Fahrt führte weiter in den äußersten Westen der Normandie zu dem berühmten Pilgerberg St. Michel. Dort erhebt sich auf hohem

Felsen die im Jahre 708 errichtete und immer wieder erweiterte Benediktinerabtei, die dem heiligen Michael geweiht ist. Durch die engen alten Gassen der Felsenstadt flutete ein unbeschreiblicher Touristenstrom, auf dem Parkplatz am Meer standen Dutzende von Bussen. Etwa 200 Stufen mußte man zur Abtei hinaufklettern, aber die Besichtigung des alten Klosters und der Ausblick lohnte die Mühe.

Der nächste Tag erinnerte mit dem Besuch eines amerikanischen Soldatenfriedhofs an die Landung der Alliierten in der Normandie im Sommer 1944 und an den Wahnsinn des Krieges. Nach Beginn der Dunkelheit schloß eine Ton- und Lichtschau den Tag ab. Sie zeigte die Einnahme einer wichtigen Brücke durch britische Fallschirmjäger im Zuge der Landung.

Die ganze Küstenregion ist übersät mit Apfelbäumen, deren Früchte zu zwei gängigen Getränken verarbeitet werden, dem Cidro und dem Calvados. Beide waren ein wichtiger Bestandteil des Kongreßprogramms.

Den französischen Kollegen gebührt warmer Dank für diesen abwechslungsreichen, bestens organisierten reichhaltigen Nachkongreß. Jogi

Elfriede Kruse 85

La 13an de marto 1999 Elfriede Kruse povis festi sian 85an naskiĝtagon. Kiu ne konas ŝin, la virinon, kiu apud sia fervojista profesio dum multaj jaroj en la gravaj funkcioj de sekretariino kundestinis la sortojn de GEFA kaj IFEF?

Kiam en la kvindekaj jaroj necesis nove strukturi la junan fervojistan asocion GEFA, ŝi tuj estis preta, transpreni la nekonatan taskon. En plej konstrua maniero ŝi plenumis tiun funkcion dum kvarona jarcento. Kaj kiam en 1968 IFEF bezonis sekretarion, Elfriede Kruse aldone transprenis ankaŭ tiun funkcion ĝis 1980. Nemezurebla estis la kvanto da laboro, kiun ŝi plenumis kaj majstris dum tiu longa tempo.

Krome ŝi dumtempe prizorgis la ĉiujaran preparadon de la IFEF-skisemajnoj. Praktike ŝi kunlaboris dum certa tempo en la konata Esperanto-vilaĝo „Bona Espero" en Brazilo. Por ŝiaj multnombraj meritoj Elfriede Kruse estis nomumita Honora Membro de IFEF kaj ricevis oran medalon de FISAIC, krome la meritkrucon de GEA.

Ankaŭ dum la pasintaj jaroj, kiujn ŝi pli private travivis, ŝi tie kaj tie dediĉis sian tempon al Esperanto, eĉ tradukis librojn. En sia privata vivo ŝi agis streĉe kaj sindoneme en sia familio.

GEFA gratulis al Elfriede okaze de ŝia ronda naskiĝtago kaj jen ripetas tion publike. Ŝi ne estas forgesita. Ni deziras al ŝi ankoraŭ multajn jarojn en kontentiga sanstato kaj sencoplena vivo. Gießner (prez.)

Allen meinen Freunden, die mich anläßlich meines 85. Geburtstages mit Glückwünschen erfreut haben, sage ich auf diesem Wege meinen herzlichsten Dank.

Elfriede Kruse

Esperanto-Senioren in Fulda

In der Bischofsstadt Fulda fanden sich am 22. April 1999 Senioren aus dem Bundesgebiet ein, allesamt Anhänger der internationalen Sprache Esperanto.

Nach Begrüßung durch den Vorsitzenden der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung führte ein Vortrag in die wechselvolle Geschichte der Stadt, die über 1000 Jahre unter dem Krummstab der Äbte und Fürstbischöfe zu Glanz und Ruhm kam. Nach gemeinsamen Mittagessen im Bahnhofsrestaurant besichtigten die Sprachfreunde die baulichen Sehenswürdigkeiten des Barock-Viertels, aber auch die Esperanto-Straße am Bahnhof. Sie wurde 1967 im Rahmen des internationalen Esperanto-Kongresses der Eisenbahner eingeweiht. Mit Dank an Rolf Terjung für das gut organisierte Treffen traten die Senioren die Heimfahrt an.

W.Barnickel

Wer kennt Dieter Palm?

Beim Leiter unserer Fernkurse, Fritz Lautenbach, hat ein Herr Dieter Palm per Fax einen Fernkurs bestellt. Leider fehlt im Fax jeglicher Hinweis auf die Anschrift. Kennt jemand Herrn Dieter Palm? Hinweis erbeten an Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda, Tel. und Fax(0661) 77627, Internet: F. Lautenbach @online.de.

Bericht aus Siebenbürgen

Die deutschsprachige Zeitung „Karpaten" in Kronstadt (Brasov) in Siebenbürgen (Rumänien) berichtet in einem langen Artikel über eine landesweiteTagung der rumänischen Eisenbahner-Esperantisten im Dezember 1998. In verständnisvoller Weise würdigte die Zeitung Ziele und Maßnahmen unserer rumänischen Kollegen.

Aus den Gruppen

Köln

En decembro 1998 mi havis la eblecon dum renkontiĝo de gepensiuloj en la evangela preĝejo en Beuel antaŭ ĉirkaŭ cent partoprenantoj voĉlegi el la Sankta Biblio la kristnaskan historion de naskiĝo Kristo laŭ Luko-evangelio en Esperanto.
Kompreneble mi aldonis kelkajn informojn dum la legado pri nia lingvo kaj poste mi vendis kvin Esperanto - lernolibrojn.
Tion mi faris ankaŭ dum kristnaska festvespero de la fervojista sindikato. Ankaŭ tie mi vendis tri lernolibrojn, sed bedaŭrinde neniu estis preta aliĝi al kurso. Sed ĉiu konsideris la legadon tre interesa kaj mia pastrino tuj aĉetis Esperanto - Biblion por la librejo.

Erhard Herlitze

Empfang in Bonn

Anläßlich des „Tages der Arbeit" wurde unser Bba Erhard Herlitze in Bonn von der Oberbürgermeisterin, Frau Bärbel Dieckmann, offiziell zu einem Empfang geladen. Teilnehmer waren Helfer sozialer Organisationen. Ihnen wurde der Dank für ihre ehrenamtliche Tätigkeit ausgesprochen.
Erhard Herlitze hatte Gelegenheit, über Esperanto zu berichten und eine Neuausgabe des bonner Stadtprospektes in Esperanto vorzuschlagen.

Fervojaj novaĵoj

Transkargejo Magdeburg

Ne nur ĉe la marbordo ekzistas havenoj, sed ankaŭ en la interna lando. Jam ĉiam la tielnomata ĥemia triangulo Merseburg - Buna - Leuna estis gravega centro de

ĥemia kaj petrola industrioj. Sed en tiu regiono mankas taŭgaj riveroj kaj kanaloj por transporti la produktojn per ŝipo.
Por avantaĝe solvi tiun problemon, DBCargo kaj ŝipentrepreno Dettmer antaŭ kelka tempo subskribis kontrakton pri kreado de moderna transkargejo en la Elbehaveno de Magdeburg. Kvin milionojn da markoj la firmao Dettmer investis en la konstruadon de la novaj instalaĵoj. Tiel eblas pumpi la petrolajn likvaĵojn rekte el la fervojaj vagonoj en la ŝipojn aŭ inverse. Tio ŝparas tempon kaj kostojn kaj plialtigas la sekurecon. Pasintan jaron la du partneroj jam transkargis 500000 t da petrolaj kaj ĥemiaj produktoj. Plialtigo ne estos problemo. En tiu nova kargo-maniero oni ankaŭ vidas prezfavoran alternativon por la trafiko kun la marhavenoj.

Surbaze de BahnZeit nove verkis Jogi

Komputiloj anstataŭ rigardo al trakoj

En la jaro 1957 la Germana Federacia Fervojo DB instalis la tiam plej modernan centran regejon en Frankfurt/M ĉefstacio. Ĝi funkciis per relajso-tekniko, kiu iom post iom malmoderniĝis. Kvankam oni fojfoje instalis pli novan teknikon, nun necesis komplete renovigi la regejon. Sed por ŝanĝkonstrui ĝin laŭ nuntempaj kondiĉoj oni estus devinta investi gigantan sumon.
Tial oni preferis krei novajn instalaĵojn, eĉ malproksime de la ĉefstacio meze en la urbo. De tie oni direktas 950 signalilojn, trakforkojn, eltrakigilojn ktp. Por ebligi tion, oni bezonis en la nova regejo 75 km kaj ekstere de ĝi 240 km da kabloj. Por ĉiu laborloko estas je dispono 9 monitoroj. Ili indikas skemon de la tuta tereno, por kiu la regejo kompetentas. La dejorantoj ĉiutage devas koordini la veturadon de ĉ. 1800 trajnoj. Sur la monitoroj oni ĉiumomente povas ekkoni, kie ĉiu unuopa trajno troviĝas kaj ĉu ĝi kuras laŭ sia plano. Se minacas malfruiĝo, koloraj linioj kondukas al la aliĝtrajnoj kaj montras, kiamaniere efikus neplana atendado, se oni volus ebligi al pasaĝeroj atingi aliĝtrajnon. En tiaj kazoj necesas rapida homa decidkapablo de spertuloj.
Per la monitoroj krome funkcias la telefono por la trajno-radiofonio, la anoncoj de neregulaĵoj kaj la observado de la traknivelaj pasejoj. La signalilojn kaj trakforkojn oni funkciigas helpe de „servostifto", kiun oni movas sur „servoplato". Do, ĉio tio signifas, ke la fervojistoj en tiu centra regejo vidas nek trajnojn nek trakojn, nur komputilojn.

Laŭ „Eisenbahn-Rundschau" verkita Jogi

Auch das ist wichtig

Der „European" ist eingestellt. Nach 10 Jahren stellte der Herausgeber der englischsprachigen europäischen Zeitschrift ihr Erscheinen ein. Bis zuletzt war es nicht gelungen, genügend Bürger der Europäischen Union als Leser zu gewinnen. Die Zeitung blieb in der Verlustzone.
Mit den European ist auch der Versuch gescheitert, Englisch als die Sprache der breiten Öffentlichkeit auf europäischer Ebene zu etablieren. Englisch ist und bleibt zwar auch in Europa die wichtigste Sprache im internationalen Austausch. Englisch bleibt aber auch die Sprache des Handels und der Profankommunikation. Es ist noch weit davon entfernt, den Sprung in die Wohnzimmer der Deutschen,

Franzosen, Griechen oder Portugiesen zu schaffen. Die Sprachenfrage in Europa ist offener denn je zuvor. Aus „Esperanto aktuell"

Bergwanderwoche

auf der Strussing-Alm 11. - 17. Sept. 1999

Zur Feier des 30jährigen Jubiläums der IFEF-Skiwochen veranstaltet Johann Geroldinger eine Bergwanderwoche und lädt herzlich dazu ein.
Bitte die betr. Ankündigung im „Internacia Fervojisto" beachten!

Neue Briefverschlußmarke

GEFA hat eine eindrucksvolle, vielseitig verwendbare farbige Klebemarke vorrätig, Größe 55 x 22 mm. Sie ist in kleiner Geschenkverpackung zu je 300 Stück für 20 DM einschließlich Porto bei Karl Bernhard erhältlich. Anschrift: Sauerbruchstr. 8, 67063 Ludwigshafen / Rh. Um Gebühren zu sparen, den Betrag am besten mit der Bestellung im Brief einsenden.

Korektaĵo

En Fervoja Esperantisto 1999/1 aperis vojaĝpriskribo tra Japanio de Heinz Schindler kun Foto de „Zwinger" en Dresden kaj ties kopio en Japanio.
Okazis miskompreno. Tiu japana kopio ne estas konstruita el porcelano, sed per normala materialo. Ĝi tamen enhavas grandan porcelan-kolektaĵon.

Mein Weg zu und mit Esperanto

Von Joachim Schrapp, Münster

Ich wurde am 30. 08. 1914 in Waldseite, Grafschaft Bentheim, geboren. Mein Vater war Bahnhofsvorsteher in Gildehaus an der Grenze zu Holland. Meine Mutter war Holländerin. Die Eltern sprachen miteinander meist niederländisch. Folglich wuchs ich zweisprachig auf. Im 2. Weltkrieg tat ich in Polen (Generalgouvernement) als „blauer" Eisenbahner Dienst und bedauerte es sehr, daß ich mich mit den polnischen Kollegen sprachlich sehr schlecht verständigen konnte.
Anfang der 50er Jahre bot die Volkshochschule Gronau (Westf) einen Esperantokursus an, den ich sofort besuchte. Die Idee, mit Hilfe dieser internationalen Sprache mit Menschen anderer Länder sprechen zu können, fesselte mich. Mein Lehrer rief anschließend einen „Sonnabend-Klub" ins Leben, dem Esperantisten von beiden Seiten der Grenze angehörten.
Ab 1953 tat ich in der Direktion Münster Dienst und zog mit meiner unterdessen fünfköpfigen Familie nach Münster. Dort trat ich der Esperantogruppe bei. 1956 verstarb meine Frau Lucie. Später heiratete ich meine Kollegin Ursula, die neue Mutter meiner drei Kinder. Sie lernte bald Esperanto, so daß wir gemeinsam am Leben der Gruppe teilnehmen und die Veranstaltungen von GEFA und IFEF besuchen konnten. Dadurch gewannen wir viele Freunde. Daheim sprachen wir sehr oft Esperanto, so daß auch die Kinder die Sprache hörten und lernten. Wir machten mit ihnen auch Ferien im Ausland, z.B. in dem bekannten Schloß Gresillon in Frankreich, wo sie mit Jugendlichen anderer Länder Fühlung bekamen.
In GEFA habe ich mehrfach an verschiedenen Stellen mitarbeiten können. So übernahm ich von 1969 bis 1974 das Amt des Bezirksbeauftragten in der Direktion

Münster, bis diese aufgelöst wurde. Später übernahm ich die Funktion des GEFA-Sekretärs von 1976 bis 1984. Auch bei der Bestellung und dem Vertrieb des GEFA-Fernkurses habe ich mithelfen können. Alle diese Funktionen haben mir viel Freude gemacht.
Nun müssen meine Frau und ich daheim bleiben. Gesundheit und Alter erfordern es. Aber wir sind deshalb nicht unglücklich, denn unsere Erinnerungen an Kongresse und Kontakte mit unseren vielen Freunden bereichern unser Leben auch heute noch. Dafür sind wir dankbar.

Mundfunk ist die beste Werbung

Auf das Weitersagen von Mensch zu Mensch sollten wir mehr Gewicht legen. Das gilt besonders für das Weitersagen unserer Erfahrungen mit Esperanto.
Wir können von dem bekannten „Hausfrauen-Tupper-Parties" lernen. Da lädt eine Hausfrau Bekannte ein und stellt die Vorzüge der Schüssel mit dem dicht schließenden Deckel vor. Weil sie selber begeistert ist, erzählt sie von ihren Erfahrungen - und begeistert auch ihre Gäste.
Begeisterung steckt an! Es fängt damit an, daß ein Esperantist einem anderen Menschen berichtet, welche Erfahrungen er mit Esperanto gemacht hat.
Mundfunk wirkt besser und direkter als Rundfunk. Gerade auf die Erfahrungen kommt es an. Hg

Sensacio en la Goethe-jaro: Fausto I kaj II en Esperanto

Bona okazo: En la jaro de la 250a datreveno de la naskiĝo de Johann Wolfgang von Goethe en la „eldonejo mondial" (Berlin) ĵus aperis ambaŭ partoj de „Faŭsto" en Esperanto.
La tradukojn faris Karl Schulze (1910-1983), en kies esperantigo siatempe en GDR jam aperis la romanoj „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz (1974) kaj la „Trigroŝa romano" de Bertolt Brecht (1977), ambaŭ en Edition Leipzig (la lasta kunlaboro kun Bleicher Verlag Gerlingen).
La manuskripton preparis kaj redaktis Ulrich Becker. Li ankaŭ verkis kelkpartan enkondukon (El la vivo de Goethe, La literatura kreado de Goethe kaj lia „Faŭsto",La „Faŭsto" en Esperanto, La tradukinto de „Faŭsto": Karl Schulze). La eldonaĵo ankaŭ enhavas ampleksan eseon de la tradukinto (La aventuro de la Faŭst-tradukado). Glosaro ĉe la fino faciligas la komprenon de diversaj aludaĵoj en la teksto.
La libro estas solide broŝurita. La kovrilo prezentas grafikaĵojn de la uson-hinda artisto Uday K. Dahr.
Ĉu esperantisto ne hezitu, rapide havigi al si la libron, kiel belegan donacon eĉ en kelkaj ekzempleroj. Ĝi ja estas elstara argumento pri la kultura valoro de Esperanto! La libro kostas nur 24 germ. markojn kaj haveblas ĉe la libroservoj.
Vi povas vin turni ankaŭ rekte al Mondial-Verlag: Giselastr.12, 10317 Berlin.

Redaktfino por FE 3/99 estos la 25. 08. 1999
Herausgeber/eldonanto: Stiftung Bahn - Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schritfleitung /redakcio: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Gustav-Heinemann-Str. 70, 28215 Bremen